Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Julio-Augusto 2002

ISSN 1163.0442

73-a jaro, n-ro 7-8 (1165-66)

MENSUEL/MONATA


Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

- Alikanto -

tre sukcesa kongreso kun grava evento apero de Nova P.I.V.








Supre : La ĉefaj motoroj de la kongreso - gekamaradoj Bustin.
Supre maldekstre: dum laboro
Sube : dum amuziĝo.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, tiun ĉi jaron nia kongreso okazis speciale frue, kaj tial vi tenas en la manoj dumonatan Sennaciulon - julio-aŭgusto. En ĝi vi povos legi la unuajn informojn pri la Kongreso kaj ĉefe pri ĝia plej granda evento: apero de la Nova P.I.V. Pli da informoj kaj kompletan raporton vi povos legi en septembra kaj oktobra numeroj. Ekde septembro atendas nin nova agadjaro kun multe da taskoj. La plej grava-por ĉiuj membroj de SAT estas provi venigi al nia asocio minimume unu novan membron. Se ni tion faros, nia membraro duobliĝos kaj tiam ni povos fari multe pli. Do, ni ĉiuj strebu plenumi tiun kongresan deziron. Uzu viajn feriojn kaj kontaktojn kun geamikoj novaj kaj malnovaj por diskonigi laboristan esperanto-movadon kaj nian SAT. Kuraĝon al ĉiuj.

Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

NOVA PERANTO EN HISPANIO

Nia k-do Marteno BUSTIN, dum la kongreso en Alikanto, rezignis pri sia peranteco (li fariĝis kandidato por la P.K.) kaj transdonis ĝin al la nova peranto. Ni dankas al k-do Bustin pro la laboro farita kaj bonvenigas la novan peranton:

K-do Pedro A. Hernandez Ubeda
c/Sainz de Barand, 3° D
ES-28009 Madrid

Konto: 2038 1787 406000178775
Tel/ 912230692, 667721951
Fakso: 917783961
Rete: esperanto@mi.madritel.es
Bonvolu do ekde nun kontakti lin por la kotizoj kaj aliaj informoj kiuj koncernas SAT.

NOVA RUBRIKO

Laŭ la propono de la 75-a SAT-Kongreso en Alikanto, "Sennaciulo" lanĉas novan rubrikon: "Kulturfako". La devon ĝin prizorgi prenis sur sin la proponintino...
Ni deziras atentigi, ke la rubriko ne estas tro vasta pro limigitaj eblecoj de la revuo samkiel de la redaktanto.
Ni pretas aperigi en ĝi informojn pri diversaj kulturaj eventoj, organizitaj de SAT, LEA-oj, SAT-rondoj kaj apartaj SAT-aktivuloj. Temas pri teatraj kaj aliaj artaj prezentoj, ekspozicioj kaj similaj artaj aranĝoj.
En la rubriko ni volonte informos ankaŭ pri kultur-edukaj verkoj publikigitaj en Esperanto de niaj membroj kaj grupoj kun kiuj SAT estas en konstanta kunlaboro.
Daŭre aperos la ĝisnuna rubriko: "Ni legis por vi", aperiganta recenzojn pri interesaj libroj.
Informojn por la nova rubriko bonvolu sendi al : Zofia Banet-Fornalowa, Bliska 12, PL-05-070 Raszyn, Pollando, per ordinara poŝto.

Ek al la laboro por la nova rubriko!
Kamaradece, Zofia Banet-Fornalowa

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ
Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

SUKCESA KONGRESO EN ALIKANTO



75-a SAT-Kongreso en Alikanto.
(meritas universitatan diplomon)

De Nagykanizsa al Alikanto estas por esperantisto nur eta distanco, aviadile iom pli ol 4 horoj.

Revidi la gekdojn, scii ke ni povas kunkiu organizado de Kongreso estas.

Evidente pro la fakto ke mi estas SAT-ano, mi neniam povas sendi al vi objektivan raporton, tamen mi vizitus infanĝardenon anstataŭ kunvenon de plenkreskuloj mi, trovus (certe) ion por plendi. Do mia plej granda plendo estas ke mi trovas nenion pri kio mi



decidi pri la estonto kaj agado de nia asocio, aŭskulti prelegojn, viziti la regionon, jen mallonge SAT-Kongreso, aŭ, ĉu ne estas preferinde paroli pri ĝenerala jarkunveno de SAT.

Ĉi-jare skipo de hispanaj amikoj zorgis, ke ni povis kunsidi en «Universitato de Alikanto». Nu skipo certe estas troigo, ĉar post malfaciloj en HALE, kie oni uzas nuntempe «La Kajerojn el la Sudo» por fifamigi SAT-on kaj laŭdi reakciajn pensojn, restis Marteno Bustin kun sia afablega edzino Liya por duope liveri gigantan laboron, mi klopodas.

Mi volas komenci per listo de plendoj. Mi alvenis dimanĉe la 30an de junio kaj pluvis en loko kie pluvo estas escepto. La taksiisto lasis min ĉe la malĝusta pordo de la Universitato. Mi surhavis tro varman pantalonon laŭ la temperaturo. La enskribiĝo suferis prokraston ĉar mi alvenis je momento de matenmanĝo kaj anstataŭ atendi min, ĉiuj esperantistoj troviĝis en manĝejo. La hispanoj vivas laŭ malsama ritmo ol mi. Plej granda plendo, mi ne spertis malfacilon kiun mi ne povis mem solvi. Eble se povas plendi.

Mi volas pritrakti la liston de bonaj aferoj. Unu horon post mia alveno mi jam povis kun la gek-doj viziti, sub gvidado de Liya, la urbon Alikanto. Kvankam matene iom antaŭ mia alveno iu studento loĝis en la ĉambro kiu estis dum unu semajno la mia, mi havis vespere freŝan liton kun puraj littukoj. Ĉiutage purigistinoj purigis la ĉambron, kvazaŭ mi loĝus en luksa hotelo. Nu parolante pri lukso, ni havis je la dispono puran bontemperaturan belan naĝejon kaj ĝardenon. Ni povis uzi tute senpage komputilojn kaj interreton, libere viziti kaj preni librojn en la giganta biblioteko, uzi ĉiujn servojn de la Universitato de Alikanto.

La laborkunsidoj de SAT okazis en granda aŭditorio, kie ni disponis pri ĉiuj iloj de luksa kunvenejo. Bedaŭrinde, kaj notu ke pri tio absolute ne kulpas la organizantoj, troviĝis malagrabla eĥo en la salono, kio malfaciligis la transdonon de informoj. Feliĉe ni povis elekti alian salonon kie la sono estis pli bona. Ŝajnas ke en la granda salono la sono nur estas bona kiam ĝi estas plenplena. (ĉu eble instigo por varbi novajn membrojn?)

Ne estas mia tasko verki raporton pri la laborkunsidoj, sed nur por doni rapidan superrigardon. Konklude mi do povas diri ke ni havis Kongreson en tre luksa loko, en tre agrabla loko laŭ temperaturo kaj aspekto. Neniu kritiko eblas, certe ne pri aferoj, kiujn plenkreskuloj, kun iom da bona volo, mem povis solvi. La nura vera problemo estis la aŭdebleco en la granda salono, sed ĉi tiun problemon kaŭzis pli la malmultnombreco de ni, kongreso-anoj (150) en komparo kun la grandeco de la salono.

Kritikon ni ĉiuj devas sendi al la Eŭropaj politikistoj, kiuj per sia preskaŭ ekstremdekstra politiko, zorgis ke 60 personoj ne povis partopreni nian Kongreson pro manko de

bezonataj paperoj.

Absolutan laŭdon mi jam nun volas sendi al la geedzoj Bustin, kies laboro ne nur estis giganta sed mirinde bona. La helpantoj kiuj ĉiam estis pretaj informi kaj helpi kaj plej laste al k-do Kreŝo Barkoviĉ kiu same majstre kaj kompetente kiel siatempe Ivo Peyraut ĉiĉeronis ĉiujn kunsidojn. En SAT, oni ne nur babilas, montris al mi la sukcesa 75-a SAT-Kongreso en Alikanto.

Kiel eble plej objektive,
Jakvo

«Teorio de feliĉo».

La proceso pri Jurij Davydov kaj Jevgenij Privalov finiĝis (mi memorigas, ke ili estis anoncitaj psike nenormalaj, ne respondecaj pri siaj agoj kaj tial la proceso okazis sen ilia ĉeesto kaj sen ĵurio). La verdikto estos anoncita la 10-an de junio.

La proceso pri Irina Derguzova kaj Tatjana Lomakina estas denove prokrastita ĝis la 20-a de junio, ĉar: 1) unu ĵuriano ekmalsanis kaj 2) la prokuroro havos 3-semajnan ferion (!). Fakte, restis pridemandi 2-3 atestantojn de defendo (se ilin en tiu tempo entute eblos inviti), diskuto de la flankoj (ĝi ne povos daŭri pli longe ol unu tagon) kaj la lastaj vortoj de la knabinoj. Se ne la prokrasto, la proceso povus atingi la verdikton de la ĵurio post maksimume tri-kvar tagoj.

Nikolao Gudskov

DEKLARACIO DE LA 75-a KONGRESO DE S.A.T.

La 75-a Kongreso de SAT, okazinta en Alikanto (ES) de la 1-a ĝis la 7-a de julio 2002,

◆ konstatas, ke Esperanto estas tute taŭga en batalo por la lingvaj rajtoj kaj informas, ke SAT eldonis novan Plenan Ilustritan Vortaron kiel unu el la rimedoj en tiu batalo.

◆ konstatas ke 60 aliĝintoj ne povis partopreni pro rifuzo de vizo, kaj protestas kontraŭ tiu malrespekto de la rajto je libera cirkulado.

◆ alvokas al batalo kontrau ĉiaj limigoj de la libereco individua kaj kolektiva sub la preteksto de ŝtata reago kontraŭ iuj armitaj grupoj;

◆ apogas la usonajn civitanojn kaj organizaĵojn kiuj batalas kontraŭ la mortpuno;

◆ Ĝi alvokas al solidareco kun la palestina popolo kaj ankaŭ kun la israelaj civitanoj, kiuj aktivas kontraŭ la milito.

GVIDREZOLUCIO

La 75-a Kongreso de SAT, okazinta en Alikanto (ES) de la 1-a ĝis la 7-a de julio 2002, petas, ke la PK :

◆ plu gardu la sendependecon de SAT en la rilatoj kun ĉiaj aliaj organizaĵoj,

◆ ĝis la venonta kongreso publikigu la regularon pri la rilatoj inter Plenum-Komitato kaj Organiza Kongresa Komitato por la organizo de niaj kongresoj, precipe pri ties financa flanko.

◆ atentigu la OKK-on, ke la programeroj de la kongresoj respondu al la celoj de SAT, kiel difinitaj en la artikolo 1 de ĝia Statuto.

◆ plu sekvu la aferojn de Billy Waldon kaj de la malliberigitoj de la grupo "Portos".

La Kongreso proponas ke :

◆la propon-komisiono ricevu la taskon proponi tagordon dum la unua laborkunsido;


◆ la raporto de la PK estu ekzamenata kiel tuto, eventualaj amendoj estu prezentitaj skribe kaj la diskuto pri tiu raporto ne superu la daŭron de unu horo;

◆ La kongreso aprobas la decidon de la Ekologiista Frakcio krei datumbankon pri ekologiaj normoj.

EN ALIKANTO APERIS NOVA P.I.V.

Marde la 2-an de julio posttagmeze, k-do Michel DUC GONINAZ per sia prelego, inaŭguris la Novan Plenan Ilustritan Vortaron

K-do **Michel Duc Goninaz**, per sia prelego rajtas aserti, ke la gekamaradoj de la P.K. trompis



K-do Duc Goninaz : «Jen, mi faris mian laboron. Nun PIV estas via».

prezentis la laboron kiun la skipo de multaj kunlaborantoj faris dum la pasintaj dekdu jaroj, depost kiam la Plenum-Komitato de SAT petis de li refari kaj ĝisdatigi tiun ĉefverkon de nia kara lingvo. Interalie li diris:

«Kiam en 1990, la Plenum-Komitato de SAT petis min entrepreni revizion de nia PIV cele al nova eldono, la obĵetoj, kiujn mi prezentis, estis refutitaj per argumentoj proksimume jenaj: *«Vi ja kapablas tion fari. La tasko ne estas tiel timinda; enmeti la Suplementon, korekti kelkajn erarojn, kiuj dise vagas, aldoni kelkajn neologismojn kaj fakajn vortojn, kiuj aperis en nia lingvokomunumo post la eldono de la Suplemento, iom ĝisdatigi la politikajn informojn... nu, entute ne tro peze...»* Mi ne min. Ankaŭ ili, evidente, ne imagis la amplekson de la tasko.

Mi unue zorgis certiĝi, ke **Waringhien** aprobas tiun planon kaj kunlaboros en ĝi. Li respondis jese al tiuj demandoj kaj, dum la jaro 1991, mi submetis al li modelon de korektoj farotaj en la unuaj sesdek paĝoj de la vortaro, kiujn mi uzis kiel eksperimentan materialon. Li reagis favore, sed, kiel ĉiuj scias, ni devis adiaŭi lin fine de tiu jaro. Tamen, lia partopreno ne ĉesis kun lia vivo. Danke al la afableco de la zorganto de la kultura centro «La Kvinpetalo», **Georges Lagrange**, kiu konfidis al mi la ekzempleron de PIV, apartenintan al Waringhien, mi povis dum la postaj jaroj transskribi ĉiujn aldonojn kaj modifojn, kiujn la ĉefredaktoro de PIV estis antaŭvidinta per manskribitaj marĝenaj notoj. Tiel rezultas, ke 358 el la modifoj faritaj en tiu ĉi nova eldono, estas de Waringhien mem. Aliajn projektojn de korektoj mi trovis en la arkivo de **Roland Levreaud**, kiu kunlaboris kun Waringhien dum la kompilado de la *Suplemento*. Tre utilis ankaŭ la abundaj notoj, kiujn verkis **André Caubel** dum la jaroj 1971-1974 kaj kiujn lia familio afable disponigis al mi.

Mi rapide komprenis, ke sufiĉe vasta laboro devis esti entreprenita por pliĝustigi la terminojn, rilatantajn al diversaj sciencoj kaj fakoj. Tiucele alvoko al kunlaboro estis farita de la Ĝenerala Sekretario de SAT al ĉiuj tiamaj membroj de la Akademio de Esperanto, al respondeculoj de ĉiuj fakaj esperantlingvaj asocioj kaj al la dekanoj de la Akademio Internacia de Sciencoj de Sanmarino. Mi optimisme petis de ili rapidan raporton pri la proponita laboro, ĉar mi ankoraŭ ne imagis la amplekson de la tasko. Sed la manko de reagoj certe ne ŝuldiĝas al tiu urĝo. El la ĉ. 50 fakaj asocioj respondis nur unu: la *Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj,* kies labormetodo montriĝis modela: ĝia terminara komisiono, sub la gvidado de **Heinz Hoffmann**, reviziis ĉiujn terminojn rilatajn al fervojo kaj prezentis sian laboron al la asocia kongreso por aprobo. El la Akademio de Esperanto - kiu propranome ne kunlaboris - dudek membroj iel kontribuis, inter kiuj dek du plenumis gravan revizian laboron. Alvoko al certa nombro da homoj, konataj pro siaj lingvosciencaj kapabloj kaj fakaj scioj, ebligis varbi kelkajn pliajn kunlaborantojn. Sed multaj reviziantoj estis varbitaj per iompostiomaj personaj kontaktoj.

...La listo, kiu enhavas la nomojn de ĉ. 90 fakaj kunlaborintoj kaj tiujn de proksimume sama nombro de diversaj kontribuintoj, montras, ĝis kioma grado la nun prezentata verko estas rezulto de kolektiva laboro.

...La regado de tiel ampleksa laboro estintus por mi neebla sen la konstanta kunlaborado de **Klaŭdo Roux**, kiu dum ĉi jaroj zorgis kun mi, kaj tre ofte pli kompetente ol mi, pri la ĝusta irado de la laboro. Al li ni ŝuldas la tutan komputikan organizon de la redakta laboro, de skanado ĝis la definitiva enpaĝigo (ellaboro prilabori ilustraĵojn rilatajn al la porPIV-aj litertipoj, skanado de la paĝoj de la malnova eldono de PIV kaj de ties suplemento, enkomputiligo de la ilustraĵoj ktp), kun la solvado de ĉiuj ĉi-rilataj problemoj, renkontitaj survoje. Sed ni precipe ŝuldas al li la kunordigon de la revizia laboro super ĉiuj fakoj rilatantaj al la parto Matematiko, natursciencoj kaj teknikoj. Malfacilega tasko estis lia, kiam li devis, krom organizi la revizion de la botanika nomenklaturo, arbitracii kaj ofte ŝtopi breĉojn en fakoj tre diversaj, sed ankaŭ interplektiĝantaj, kiaj kemio, biologio, zoologio, ekologio kaj ceteraj.

Nepre menciinda estas ankaŭ la kontribuo de **Serge Sire**, kiu komencis en 1999 prilabori ilustraĵojn rilatajn al teknologio, sed samtempe eltrovadis ĉiutage dezirindajn plibonigojn en la prezento de la terminoj rilataj al tiu multfaceta fako kaj, en la lastaj monatoj de la laboro, elpensis komputilajn procedurojn por koherigi la referencojn, tiel fajnigante la tre utilan kontrolon de la referencoj, kiun antaŭe faris **Wolfram Diestel**.

La detalan kaj kompletan prezenton de tiu ĉi laboro ĉiu povos legi en la unuaj paĝoj de la Nova PIV.

Fine de tiu ĉi mallonga prezento ni donas la nomojn de ĉefaj kaj plej gravaj kunlaborantoj :

Aparte gravaj Kunlaborintoj (kunlaboris konstante kaj/aŭ amplekse, fake kaj/aŭ ĝenerale) :

A. Andrieu, André Cherpillod, André Gilles, Edmund Grimley Evans, Klaus J. Günkel, Christer P. Kiselman, Georges Lagrange, Ma Young-Tae, Olav Reiersol, Paul Signoret, François Simonnet, Ebbe Vilborg.

Ĉefaj fakaj kunlaborintoj :

Jouko Lindstedt, André Albault, Pierre Dieumegard, Pierre Jelenc, Jan Werner, Maurice Jeanjean, Hans M. Maitzen, Amri Wandel, Ralph A. Lewin, Nina Korĵenevskaja-Gouriou, Perla Ari Martinelli, Armando Zecchin, Gerrit Berveling, Cho Sung Ho, Nisi Yasuhiro, Bert de Wit, Yamasaki Seikô, Hideg Sandor, Jean-Luc Tortel, Heinz Hoffmann, Vinko Oŝlak, Konrad Hinsen, Jannes Markus Mabesoone, Nikolaj Starodubcev, Vincent Charlot, Brian Moon, Bernhard Eichkorn, Koutny Ilona, Vilhelmo Lutermano, H.S. Holdgrün, Stevens Norvell, Claude Beaujard, Andreo Marshall, Zbigniew Galor, Thérèse Pinet, Tazio Carlevaro, Claude Piron, Werner Bormann.

Aliaj fakaj kunlaborintoj :

Patrick Lagrange, Jaroslav Mraz, Georges Clauzade, Isabelle Jacob, Leo de Cooman, Alain Fabre, Jacques Roux, José Vinck, Gunnar Gällmo, Reinhard Haupenthal, Christian Lavarenne, Jesper Lykke Jacobsen, Donald Rogers, Ingemar Kaj, Olav Bjornsrud, Michel Simon, Marc Vanden Bempt, Meszaros Béla, Ahn Song-san.

Pluraj aliaj esperantistoj partoprenis en la korektado de skanitaj paĝoj aŭ sendis diversajn rimarkojn. La nomoj de ĉiu aperas en la nova PIV.

La Plenum-Komitato de SAT per tiu ĉi vojo esprimas al ĉiuj sinceran dankon pro la granda kaj gravega laboro farita de tiu nombra esperantista kolektivo cele al la renovigo de nia Plena Ilustrita Vortaro, Aparta danko al ĉiuj individuoj kaj Asocioj kiuj malavare donacis monon al la PIV-fonduso por helpi al la eldono de tiu ĉi ĉefverko.

La 4-an de julio 2002 j. dum la 75-a Kongreso de SAT okazis kunveno de ekologiista frakcio.
K-do Geĥt G. (Ukrainio) informis pri situacio en Ukrainio okaze de ŝanĝo de leĝoj en tiu lando.
Estis akceptita la rezolucio.

REZOLUCIO
de ekologiista frakcio de SAT

Komenci kreadon de ekologia datumbanko (direktivoj de EU, ŝtataj leĝoj, normoj, reguloj k.t.p.)
Komisii k-don Geĥt (Ukrainio) kontakti k-don Bert de Wit por ricevo de liaj konsiloj.
Komisii k-dinon Auderskaja (Ukrainio) kontakti AVE por ricevo de konsiloj.
Komisii k-don Geĥt (Ukrainio) raporti al la Kongreso pri kunveno de ekologiista frakcio
Krei paĝon de tiuj dokumentoj en Interreto.
Publikigi artikolojn en Sennaciulo kaj AVENO.
Peti subtenon de aliaj organizoj (UEA, AVE) por kreado de tiu datumbanko.

La alia Kongreso - SATEB-Konferenco
(aŭ oni ne nur veturas maldekstre en Britio)

Ke esperantistoj ŝatas partopreni al kongresoj estas sama vero kiel la vero ke britoj veturas ĉe maldekstra flanko de la strato. Kvankam mi ne konsideras min mem esperantisto, sed nur uzanto de la lingvo, mi ŝatas de tempo al tempo viziti Kongreson. Mi faras tion, ĉar kongreso donas la eblon diskuti kun homoj, kiujn vi ne aŭ apenaŭ konas. Intertempe mi jam plurfoje vizitis «SAT-Amikara Kongreso»-n, kie mi post foriro ĉiam devas adiaŭi plurajn karajn amikojn.



Kongreso kiun mi ĝis nun neniam vizitis estas tiu de SATEB. Do, kiam oni petis al mi fari prelegon en Barlastono, mi ne hezitis.

Mia edzino, kiu ege ŝatas Anglio-n, decidis kunvojaĝi, ankaŭ la filino, tro juna por resti hejme tutsola, entrajniĝis en Brusela stacidomo kun celo, neniam antaŭe vizitata regiono.

Forlasante la submaran tunelon, tuj okulfrapis la unuaj diferencoj. Ŝafoj anstataŭas niajn bovinojn kaj la naturo aspektis iom pli kolora ol ĉe ni.
De stacidomo Waterloo al Euston estis dank'al subtera tramo la plej rapida maniero por iri al alia trajno, kiu devis direkti nin al Barlastono.

Freneziga estis la aĉetado de trajnbileto en stacidomo Euston. Ni en Belgio aĉetas bileton je fiksa prezo, kaj la sistemo en Anglio malfermas multegajn eblojn. Oni ne aĉetas bileton, oni diskutas pri la prezo kvazaŭ tio rilatas la aĉetadon sur ĉifonmerkato. Montriĝis, ke prenante trajnon unu horon malpli frue, ni ŝparis 40% el la prezo! Necesis telefoni al Barlastono por anonci nian malfruiĝon dank'al privatigo de la publika trafiko. Kiom da malŝparo de energio pro la marĉandado pri bileto, je tamen, tro alta prezo. Nova seniluziiĝo kiam montriĝis ke preskaŭ duono de la trajno estas rezervita al unua klaso kaj kvar kvinonoj de la cetero estas rezervitaj lokoj por tiuj kiuj antaŭmendis bileton.

Mi notis en libreto: «nepre agadu kontraŭ privatigo de publika servo post reveno al Belgio»!

Vizaĝo de Arturo, kiu atendis nin en stacidomo de Stoke-On-Trent tuj forviŝis la malagrablan sperton kun kapitalismo en Britio kaj rapide ni veturis aŭte al Barlastono.

Bedaŭrinde, pro malsano kaj malhelpo, pluraj k-doj ne povis partopreni al la Kongreso, sed rapide montriĝis ke tiuj, kiuj venis estis entuziasmuloj.

Ni havis kiel loĝlokon «The Lodge», domo kiu iam apartenis al la domgardisto de la «bieno».

Post trankviliga nokto ni jam senpacience atendis la horon de matenmanĝo laŭ brita stilo, stilo kiun oni pli kaj pli transprenas en niaj regionoj. Ĉiuj bongustaĵoj de la grenoj ĝis la kafo. Montriĝis poste ke ĉiuj manĝoj zorge estis preparitaj kaj ke la tablo ĉiam estis riĉa pri diversaj bongustaĵoj

La memevidento per kiu Pearl Simons malfermis la unuan laborkunsidon, montris al mi, ke mi troviĝas inter spertaj esperantistoj. Unue oni silentis unu minuton, honore al k-doj kiuj mortis dum la lasta jaro.

La elekto de protokolonto signifis la veran ekstarton de la jarkunveno.

La kunveno okazis akurate kun respekto por la antaŭanoncitaj eroj kaj tempodaŭro. Eĉ ne unu momenton la radoj knaris aŭ stagnis kaj mi devas konfesi ke ĝis nun mi neniam partoprenis kongreson nek jarkunvenon kiu tiel vigle kaj lerte okazis. Mi preskaŭ povas paroli pri profesia kunveno. Eroj, kiujn mi en ĉiuj kunvenoj devas aŭskulti ankaŭ revenis en Barlastono. Manko de junaj esperantistoj. Plendo kiun mi ĝis nun neniam konsideris grava, ĉar mi ne jam aŭdis pri esperanto dum olimpiaj ludoj. Por esti bona esperantisto, oni kapablas paroli kaj prefere skribi la lingvon. Neniu fizika sperto necesas kaj en la kazo de SATEB Kongreso kie ĉiuj partoprenantoj montris respekton por la aliaj, eĉ la debatoj ne lacigis.

Malkresko de membraro. Se ne junajn oni almenaŭ devas trovi novajn membrojn, bedaŭrinde ne nur en Britio. Ni nur esperu ke ni troviĝas en la plej profunda parto de la malagrabla nuna ondo.

Kio donis al mi grandan kontenton estas la rilato de SATEB kun SAT. La celo de SATEB estas klare ne nur varbi novajn membrojn al propra enspezo, sed la celo klare estas, prepari novulojn al membreco de SAT.

Evidente ne havas sencon ke mi eron post eron rakontas pri la kongreso. Ĝenerala bildo kiun mi havas pri SATEB-Kongreso estas ke oni ne laboras izolita en Britio. Ekzistas sufiĉe da intereso por tio, kio okazas en neŭtrala movado kaj laŭ mia kompreno la rilato estas tre amika. La celo de SATEB estas instrui Esperanton kaj plifortigi SAT-on. Okulfrapis al mi, la tre progresema karaktero ĉe la britaj esperantistoj en SATEB, la laborpreteco kaj energio. Oni konscias ke la nuna tempo ne tiel favoras al progresemaj idealoj kaj malgraŭ tio, neniu metas la manojn en la sinon (Flandra esprimo por diri ke iu ĉesas agadi).

Kun granda entuziasmo mi faris miajn prelegojn, ĉar mi sciis ke mi parolis antaŭ publiko kiu ne nur defendis la idealon de universala lingvo, sed ankaŭ de ideologia socialismo kaj progresemo.

Mi adiaŭis SATEB post du tagoj, sed mi esperas ke post nelonge mi povos reviziti la verdegan landon kun afablaj k-doj. Espereble dum SAT-Kongreso ie en regiono Barlastono.

Ni revidos, mi ne scias kie kiam, sed mi scias, ni revidos nin iun sunan tagon. *Jakvo*


KONTRAŬPERSONAJ MINOJ

Per artikolo aperinta en la numero 1145 (novembro 2000) de Sennaciulo, mi indikis kiel la franca leĝo n°98-564 de la 8-a de julio 1998, permesis la kreadon de la Nacia Komisiono pri la Elimino de kontraŭpersonaj minoj. Mi ankaŭ donis, en tiu artikolo informojn pri la laboroj de tiu komisiono publikigitaj en la unua raporto.

La preparo kaj la redaktado de la dua raporto montris, ke estas serioza kaj profunda malkonsento inter la komisiono kaj la ministerio de la defendado pri la kontrolo de la stoko de kontraŭpersonaj minoj. La franca registaro volus, ke la komisiono limigu sian agadon al la registrado de ĝiaj decidoj. La komisiono rifuzas tion.

Permesata stoko

La Konvencio de Otavo kaj la Franca leĝo rajtigas maksimuman



Viktimo de minoj

stokon de 5000 kontraŭpersonaj minoj por la senminigesplorado, kaj instruo de la praktiko de la senminigo. La komisiono kontrolis, ke la nombro de minoj ne superas 5000, malgraŭ la renkontitaj malfaciloj pro modifoj de la nomoj de minoj. La ministerio de la defendado modifis la nomojn, sed konsideris, ke estis neutile informi la komisionon. Tia konduto evidente malhelpis la laborojn de la komisiono.

La komisiono ne povis kontroli la movojn kaj la uzon de minoj de tiu stoko, ĉar la ministerio ne transdonis la necesajn promesitajn dokumentojn por tiu kontrolo. Kontraŭ tiu malbona kunlaboro, la komisiono sendis multajn leterojn al la ministerio, kaj atendas respondojn.

Dubaj kontraŭtankaj minoj

La Nacia Komisiono por la Elimino de Kontraŭpersonaj Minoj havas nenian povon koncerne la kontraŭtankajn minojn. Tamen, por koni la funkciadon de tiuj minoj, la laborgrupo de tiu komisiono renkontis delegacion de la franca armeo, kaj delegacion de unu franca entrepreno, kiu fabrikas minojn. La franca armeo prezentis ĉiujn tipojn de minoj, kiujn ĝi uzas.

Kontraŭtanka mino horizontale aganta

Tiu mino eksplodas post la rompo de unu tre maldika fadeno, kiu estas ligita al la mino, kaj estas elemento de tiu ĉi. La fadeno estas ofte metata tra vojo. La militistoj diris, ke la pezo de unu infano sufiĉas por rompi la fadenon.

Unu homo senintence povas eksplodigi la minon, kaj la ago, kiu neprigas ĝian eksplodon, estas identa kun la ago, kiu neprigas la eksplodon de kontraŭpersona mino. Do, la komisiono petis, ke tiu tipo de kontraŭtanka mino ne plu estu uzata. La ministerio de la defendado rifuzis, sed ĝi ordonis studadon por modifi la mekanismon, kiu neprigas la eksplodon. La komisiono sekvos kaj kontrolos la modifojn.

Kontraŭtanka mino eksplodanta pro variado de la magneta kampo

Tiu mino eksplodas pro la variado de la magneta kampo, kiu ĉirkaŭas ĝin. La militistoj kaj la estraro de la franca entrepreno kiu fabrikas tiujn minojn, asertis, ke la variado de la magneta kampo pro homa ĉeesto en la medio de la mino, ne eksplodigas ĝin. Por kontroli tiun aserton, la komisiono petis provon per unu manekeno, kiu havos la pezon kaj la staturon de homo. La ministerio ne ankoraŭ respondis al tiu peto, sed la komisiono denove agos por ke la provo realiĝu.



Mana senminigo : danĝero

Senminigo

La mana senminigo estas tre longa, kaj tre danĝera por la senminigistoj. La deputito Francisko Rochebloine, membro de la komisiono, opinias, ke estas nepre necese uzi maŝinojn por la senminigo sur la terenoj, kiuj permesas ilian uzon. Tial, li kontaktis estrarojn de francaj entreprenoj, kiuj fabrikas senminigmaŝinojn, kaj kiuj senminigas. Poste, li petis al la komisiono interveni ĉe franca registaro por ke tiu ĉi kuraĝigu, kaj subtenu tiujn entreprenojn.

Aliaj punktoj de la raporto

Kun mia amiko, la deputito Francisko Rochebloine, mi precipe prilaboris la antaŭajn punktojn en la laborgrupo «Kontrolado de la detruo de stokoj». Mi nur iom konis aliajn punktojn de la raporto, kiuj estas : «Ago de Francio pri asistado al la viktimoj», «Pripensado pri rajto de viktimoj», «Universaligo kaj kontrolado de la Konvencio de Otavo». Dume, mi povas indiki ke :

- unu nova difino de kontraŭpersonaj

minoj, en la Konvencio de Otavo, estas celo de la komisiono ;
- Sinjorino Stern, Prezidantino de la komisiono, volas organizi, dum la jaro 2002, internacian kolokvon kun aliaj naciaj komisionoj por kunordigi agojn kaj intervenojn.

Konkludoj

Rimarko

Mi estas partizano de la unuflanka malarmado de mia lando, sed laboro por la malarmado, en komisiono, povas ankaŭ servi pacon. Mi opinias, ke estas necese fari unuan paŝon, kaj la detruo de kontraŭpersonaj minoj estas unua paŝo survoje al totala malarmado, eĉ se tiu paŝo estas tre eta. Beraŭdinde, ni notu, ke Ĉinio, Rusio, Usono ne ankoraŭ subskribis la Konvencion de Otavo, kaj tamen ili havas tre gravajn stokojn de kontraŭpersonaj minoj.

Kontenteco

La laboro de la komisiono pri kontraŭtankaj minoj devigis la francan registaron entrepreni modifojn kaj projekti provojn pri tiuj minoj. Tio pruvas ke la civitana batalo povas influi la registaron.

Maltrankvileco

Francio estas en periodo de elektado*; tial estas necese atendi la estontan registaron por koni la respondojn al la demandoj de la komisiono. Sed, kia estos la estonta registaro ?

Unu franca entrepreno posedas studaĵon pri obuso. Tiu obuso enhavus kontraŭtankajn (aŭ kontraŭveturilajn) minojn, kaj ĝi povus esti lanĉata ĝis dudek kilometroj. Kiam la obuso eksplodus, la minoj estus disĵetataj sur la grundon por ekzemple, ĉirkaŭi la militistojn. Sed, en la nunaj armitaj konfliktoj, civiluloj kaj militistoj ofte estas intermiksataj, kaj kontraŭveturila (aŭ kontraŭtanka) mino ne scias distingi inter kamiono kun civiluloj kaj kamiono kun militistoj, aŭ inter kamiono kun civiluloj kaj tanko…ĝi eksplodas. Feliĉe, tiuj obusoj ne ankoraŭ estas fabrikitaj. Tamen la komisiono devos esplori tiun punkton.

André Weiss

**NDLR: Tiu ĉi teksto estis verkita antaŭ la franciaj balotoj.*

LETERO DE LA «FELIĈULOJ»

Hieraŭ, 10.07.02, estis deklarita la verdikto kontraŭ ankoraŭ du membroj de PORTOS - Irina Derguzova kaj Tatjana Lomakina. La verdikto estas plene akuza, kaj al la knabinoj minacas 12 jaroj en prizono, kaj en la nuna situacio la advokatoj havas nur du vojojn por la plua defendado:

1) atingi malplilongan punperiodon;
2) pledi al la Supera Kortumo por aboli la verdikton.

Ŝajnas, ke ili uzos ambaŭ vojojn, sed la ĉefa afero estas, ke la batalo daŭras.

Al ĉiuj esperantistoj de la mondo, unuavice al la membroj de SAT, la membroj de PORTOS sendas la sekvan leteron.

****

Saluton, karaj geamikoj!

Ni tre dankas al vi pro via helpo kaj partopreno en nia batalo por liberigo de niaj amikoj kaj nia unuiĝo kun ili, kontraŭ falsa proceso, fabrikita de fipolicistoj el la urbo Lubercy (RUBOP - Distrikta Oficejo por Batalo kontraŭ Organizita Krimeco), kaj de Moskva regiona prokurorejo.

Jam 1,5 jaroj niaj amikoj Jurij Davydov, Irina Derguzova, Tatjana Lomakina kaj Jevgenij Privalov troviĝas en prizono. Kaj ankoraŭ deko el niaj membroj estas akuzataj kaj ĉiumomente povas esti arestitaj.

Nia «kulpo» estas en tio, ke ni ne deziris vivi kiel la plimulto - indiferente vegeti sen zorgoj pri la estonto de la planedo. Ni volas vivi en feliĉa socio kaj per ĉiuj niaj eblecoj fari la vivon ĉirkaŭ ni homeca, vereca, boneca.

Tial ĉiu el ni evoluigas sian personecon kaj inteligentecon en 100 direktoj: sobra sana vivmaniero sen narkotaĵoj, sen drinkado, sen fumado, ni naĝas en glacia akvo; ĉiu verkas versojn, partoprenas muzikan ensemblon, helpas al veteranoj kaj emeritoj; ni organizis eksperimentajn industriajn kaj agrikulturajn entreprenojn por lerni kaj evoluigi metodojn de plialtigo de laborproduktiveco kaj ties ekologieco. Sed la ĉefa afero estas strebo al unuiĝo de ĉiuj progresemaj fortoj de la mondo, ĉar ni komprenas, ke la homaro povos savi sin nur kiam ĝi lernos la manieron de solidareca agado.

Problemoj de ekologio, sano, konservado de la planedrimedoj, batalo kontraŭ teroro, morala krizo en la socio maltrankviligas ĉiun el ni - rusojn, francojn, japanojn, usonanojn. Por komune solvi ĉiujn problemojn ni nepre devas uzi Esperanton - klaran lingvon bazitan sur klaraj ideoj - esperante la Feliĉon kaj Progreson de la Homoj de la tuta mondo.

Veraj Homoj de ĉiuj landoj - unuiĝu!
Dankon pro via helpo.
Ni daŭrigas nian batalon por nia kaj via libero! Ĉis revido, geamikoj!

Membroj de la Poeziigita Unuiĝo por Prilaboro de la Teorio de Komuna Feliĉo.

FINANCA RAPORTO 2001

La rezulto de la jaro 2001, bedaŭrinde daŭre estas malprofita. Pli da kotizantoj kaj da vendoj helpus plibonigi la situacion. Pro pli da vendoj ol da aĉetoj, la stoko estas malpli forta kaj konsekvence la variado de la stoko estas pli alta. Nun la valoro de la stoko ne plu havas balastojn de ne vendeblaj varetoj. Tamen zorga estas la fakto ke eĉ la plej laste eldonitaj libroj ne sufiĉe vendiĝas.

Ankaŭ oni povas konstati la plialtiĝon de la kostoj de la presado kaj ekspedo de niaj revuoj, pro la lastjara apero de la S.R. kaj de la Adresaro.

La plej grava parto de la subvencio kuŝas en la invitoj al la kongreso en Nagykanizsa.

TEREZA SABATIER

ASOCIAJ SPEZOKONTOJ POR LA JARO 2001 (en €) - PARIZO

KOSTOJ	2001	2000
Aĉeto de varo	2189	2753
Variado de la stoko	2856	1452
Aliaj aĉetoj kaj servoj	5605	3481
Presokostoj	12218	8949
Sendokostoj de la revuoj	6023	4780
Aliaj afrankaj elspezoj	1342	1693
Sidejaj domŝarĝoj	1203	2087
Telekomunikiloj	1302	1234
Elektro	637	733
Vojaĝkostoj delegitoj + honorarioj	1776	1489
Asekuro	239	239
Impostoj kaj taksoj	104	115
Salajro - malneta	27094	26346
Sociaj ŝarĝoj	13548	13289
Amortizo	1859	2594
Subvencioj	365	
Financaĵoj	151	53
Diversaĵoj	386	550
Entute	**78897**	**71837**

RIMEDOJ	2001	2000
Vendo de varo	8014	7979
Kotizoj, donacoj	64335	58395
Interezoj	1843	781
Rezultato (perdo)	4705	4682
Entute	**78897**	**71837**

RAPORTO DE LA REVIZOROJ

Post la kontroloj kiujn ni faris super la spezoj en Parizo, koncerne la jaron 2001, ni deklaras, ke la kontoj estas en bona ordo. Al ni estis komunikitaj la dokumentoj pruvantaj la realecon kaj ĝustan aplikon de ĉiuj spezoj.

R. MEURANT C. BILLARD

BILANCO JE LA 31.12.2001 (en €) - PARIZO

AKTIVO	2001	2000
Asocia sidejo	8437	8437
Meblaro, tek. materialo (malnete 22912 - amortizo 18152)	4760	3524
Garantiaĵo	152	152
Sume (I)	**13349**	**12113**
Librostoko	18333	21189
Debitoraj libroservoj	4676	3911
Ricevotaj kotizoj	11824	6667
Ricevotaj taksoj	2293	1028
Aliaj debitoroj	800	3619
Rezervo	18526	18526
Disponebla mono	55803	63632
Ŝarĝoj	563	441
Sume (II)	**112818**	**119013**
Entute (I+II)	**126167**	**131126**

PASIVO	2001	2000
Asocia kapitalo	15502	20185
Kontojara rezulto	- 4707	- 4682
Sume (I)	**10795**	**15503**
Deponoj (fakoj kaj membroj)	113798	112010
Pagotaj fakturoj k. asociaĵoj	914	935
Kongresdepono	660	2678
Sume (II)	**115372**	**115623**
Entute (I + II)	**126167**	**131126**

Komunista Frakcio

Konciza Raporto

de Stan Keable

Dum la 75-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (Laborista Esperantista Movado) en Alikanto, Hispanio, kiu okazis de la 1-a ĝis la 8-a de Julio 2002, Komunista Frakcio de SAT kunvenis plurajn fojojn.

Nia malgranda skipo da kvin komunistoj bone kontribuis al kongresa laboro. K-doj Vincent Charlot kaj Stan Keable partoprenis Kongresan Komisionon, kiu pritraktis vortumon de la Gvidrezolucio kaj Deklaracio, kiujn la kongreso poste amendis kaj adoptis.

Efikeco de la kongreso suferis pro manko da bone elpensitaj proponoj, kaj manko de planita tagordo pri diskut-temoj en laborkunsidoj. Ni fieras, ke el diskutoj de nia Frakcio venis proponoj, kiuj espereble helpos ke venontaj kongresoj de SAT estu pli efikaj. Sed ni atentigas ke la ĉefa bezono por efika kongreso estos ke oni faru proponojn (rezoluciojn), kiuj aperu antaŭ la kongreso en Sennaciulo. Antaŭ ĉi tiu kongreso, neniu faris tion. Sen semado, ne atendu rikolton!

K-do Charlot portis mesaĝon de K-do Petro Levy, ke li deziris post longedaŭra deĵorado rezigni el posteno de Frakcia respondeculo. Tio estis akceptita, kaj la Frakcio decidis danki la kamaradon kaj peti lin, ke li akceptu novan postenon - Honora Prezidanto de Komunista Frakcio. Certe estas honoro por nia Frakcio, ke tiu veterano de Komunista Partio de Francio, tiu gravulo de SAT, kiu delonge funkcias ĉe redaktora komitato de Sennaciulo - monata gazeto de la organizo - estu nia Honora Prezidanto.

Grava rolo de nia Frakcio estas varbi komunistojn al Esperanto kaj al SAT. Por tiu laboro, ankaŭ estos utila trovi, kunligi kaj organizi tiujn komunistojn kiuj jam estas membroj de SAT. Ankaŭ estos utila varbi al SAT tiujn membrojn de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo, kiuj estos pretaj kunlabori. Ankaŭ tiuj, kiuj sin trovas dise en Universala Esperanto-Asocio kaj cetera Esperantista movado. Ni instigas vin, kamaradoj, aliĝu al SAT kaj anoncu vin al Komunista Frakcio por kunlaboro.

Du kamaradoj akceptis postenojn por antaŭenigi frakcian laboron. Stan Keable estas sekretario, kaj Frederico Scibor respondecos pri la frakcia retpaĝo. Jen iliaj referencoj:

Frederico Scibor (retpaĝo)
<frederic.scibor@wanadoo.fr>

Stan Keable
16 Aylesbury Street,
London NW10 0AS, Britio.
Tel: 0044 7866 606 085 au 0044 20 8450 6705.
<KeableStan@aol.com>

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris
Tel: +33.1.47.97.87.05
Fax:+33.1.47.97.71.90
Rete: satesper@noos.fr

DUM LA KONGRESO EN ALIKANTO
APERIS NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Eŭropo: 77 € (inkl. reg. afranko).
ekster Eŭropo :79 (inkl. reg. afranko).
Ni petas ĉiujn mendantojn iom pacienci ĉar ni ne estas nombraj en la oficejo kaj necesas iom da tempo por paki kaj ekspedi la menditajn librojn.

HELPO AL ASOCIO

En Pollando (PLZ) Dabek 25,00; Solecka 15,00; E. Jesion 5,00;
En Svedio (SEK) Gotenburga klubo memore al Yves Peyraut 6.948,29; Huskvarna klubo memore al Yves Peyraut 3.553,45; Memore al Göte Landen 1000,00;
En Germanio (€) Schmid 1,00; Landmann 101,00; Grupp 6,00; Conzeth 6,00; Stephan 1,50; Wohlers 1,00; Knötzsch 11,00; Knoeferl 1,00;
En Francio (€) anonime 500,00; F. Pellegrino 4,00;
En Aŭstrio (€) M. Hollinger 13,40;

FILATELA SERVO

Nia k-do Modesto, prizorganto de la filatela servo, sendis al ni ĉekon da 141,07 eŭroj kiujn li enkasigis per vendo de viaj poŝtmarkoj. Jen la kontribuantoj:
Giloteaux, Nicolas Xil, R. Sarrut, M. Bustin, Robert, Rapley, Masseron, Lebec, Vološyn, Collet, Schneider, SAT-Amikaro, Humm, Jankovski. Ni dankas al ĉiuj kaj invitas ĉiujn daŭre sendi poŝtmarkojn al k-do Ramelli Modesto, 11 Impasse Moulin Neuf, FR-57160 Chatel-St. Germain, Francio.

ĈIU VARBU NOVAN MEMBRON !

SAT havas novan domajnadreson:
sat-esperanto.org

PROVŜTONO

de KURISU Kei

La 8-an de januaro en la frontpaĝo de "Akahata" (Ruĝa Flago), la ĉiutaga organo de Japana Komunista Partio, aperis artikolo, laŭ kiu bone konata verkisto IKEZAWA Natuki, kiu siatempe ricevis la premion "Akutagawa" (la plej prestiĝan literaturan premion en Japanio), eldiris en radio : "Mi konsilas al vi, karaj aŭskultantoj, legi "Akahata"-n almenaŭ unufoje ĉiusemajne". Sendube la redakcio de "Akahata" volis uzi tiun eldiron de Ikezawa, kiu estas nek ano de Japana Komunista Partio (JKP), nek ĝia simpatianto, por montri utilecon de "Akahata".

Efektive, ankaŭ por mi, kiu estas samkiel Ikazawa nek ano de JKP, nek ĝia simpatianto, ĝi estas utila, ĉar de tempo al tempo mi trovas en ĝi interesajn artikolojn, kiaj ne troveblas en aliaj komercaj gazetoj.

Sed traleginte tiun artikolon mi samtempe pensis, ĉu JKP estas vere malfermita partio kiel ĝi deklaras sin al la popolo kaj kiu akceptas kritikojn eĉ de eksteruloj, se montriĝas ke ili estas pravaj. Mi do tuj verkis artikolon kaj sendis ĝin fakse al la redakcio de "Akahata".

Sed ĝis nun mia artikolo ne aperis malgraŭ ke de tiam pasis pli ol du monatoj*, kvankam intertempe en ĝi aperis eĉ du artikoloj, kiuj montras utilecon de Esperanto. La 20-an de februaro, ĝuste dum la 69-a datreveno de la murdo de KOBAYASI Takizi, la aŭtoro de "Krabŝipo", fare de Tokkô, la japana sekreta polico. En la artikolo oni informis ke mia eseo pri "Krabŝipo" estas publikigita en la lasta n-ro de "Sennacieca Revuo", eldonita de SAT, mondorganizo de la laborista esperanto-movado, kaj ke evidentiĝis, laŭ ĝi, ke la slovaka traduko de "Krabŝipo" farita el mia esperanta traduko, eldoniĝis en 1951. Tiu artikolo estis ilustrita per kolora foto de la kovrilpaĝo de S.R. Sur tiu kovrilpaĝo troviĝas poŝtmarko emisiita de la japana poŝto memore al la "Krabŝipo".

La 15-an de marto aperis artikolo bazita sur intervjuo kun mi pri la slovaka traduko de "Krabŝipo". Danke al mia eseo en S.R., unuafoje evidentiĝis, ke krom la tradukoj ĉina, rusa, angla, ĉeĥa, germana kaj vjetnama estas ankaŭ slovaka traduko. Tiu sklovaka traduko slovakigita laŭ mia esperanta, estas kompleta, sen iaj ajn forstrekoj, ĉar mia esperanta traduko estis farita laŭ la japana eldono, kies forcenzuritajn lokojn kompletigis por mi verkisto KIS Yamazi, kiu antaŭmilite okupiĝis pri redaktado de la verkaro de Kobayasi.

Tio estas grava laŭ ÔTA Tutomu, ĉefredaktoro de "Sin Nihon Syuppansya" (Eldonejo Nova Japanio), kiu siatempe okupiĝis pri la redaktado de la verkaro de Kobayasi aperinta postmilite ĉe tiu eldonejo. Laŭ mia scio, krom la slovaka, nur la ĉina traduko estas kompleta, ĉar sendube ĝi estis farita laŭ la japana eldono sen iaj ajn forstrekoj, sendita de Kobayasi mem, kiel pruvas la fakto, ke por ĝi li speciale verkis la antaŭparolon.

En tiu artikolo estas ankaŭ menciite, ke la slovakan tradukon karakterizas ankaŭ, ke ĝi enhavas la antaŭparolon de KURAHAKA Korehito, literatura kritikisto, kiu postmilite gvidis la kulturan sekcion de JKP, kaj la postparolon de NAKANO Sigeharu, poeto kaj novelisto, postmilita parlamentano de JKP. La artikolon ilustras la foto de la kovrilpaĝo de la slovaka traduko kaj mia foto.

Ĉio tio estis avantaĝa por ambaŭ flankoj. Por JKP, ĉar ĝi ĉerpis de mi informojn utilajn kaj interesajn por la legantaro de "Akahata", kaj por la esperantomovado, ĉefe por SAT, ĉar per tio JKP kaj la legantaro de "Akahata" informiĝis pri Esperanto kaj pri SAT. Ili povis konstati ke Esperanto daŭre ekzistas kaj utilas al la popolo kaj ke ekzistas mondorganizo de la laborista E-movado, kiu nomiĝas SAT. Tio ankaŭ estis avantaĝa por mi, ĉar tiel la legantaro de "Akahata" eksciis ke mi estas ne nur tradukisto el la ĉeĥa literaturo sed eĉ malnova esperantisto, kiu jam antaŭmilite esperantigis "Krabŝipon".

Bedaŭrinde, la redakcio de "Akahata" ĝis nun ne publikigis mian artikolon "Provŝtono". Kial? Mi supozas ke pro la fakto, ke ĝi ne deziras ke la legantaro eksciu, ke JKP en sia pasinto maljuste intervenis en la eldonado de "Riporto skribita en la pendumila maŝo" de Julio Fuĉik, simple pro la fakto ke ĝin japanigis ĝuste mi mem. Por JKP mi estis perfidulo, ĉar mi ĝin forlasis. Ĝi eĉ malpermesis al mi aboni al "Akahata" pro la sama kialo. Ĉu tio estas ĝusta kaj justa?

Mi do decidis esperantigi tiun mian artikolon kaj publikigi ĝin en "Sennaciulo", por ke SAT-anoj el la tuta mondo ne nur prijuĝu sed ankaŭ solidare skribu al la redakcio de "Akahata", letere, fakse aŭ rete por instigi, ke ĝi aperigu ĝin. La aperigo pruvos almenaŭ parte la malfermitecon de JKP kaj de ĝia organo. Mi tion atendas precipe de kamaradoj el la Komunista Frakcio. Estus bone aprobi kaj laŭdi la redakcion de "Akahata", ke ĝi publikigis la du antaŭe menciitajn artikolojn kiuj pruvas la utilecon de Esperanto por la popolo.

La poŝta adreso de "Akahata" estas : Sendagaya 4-26-7, Sibuya-ku, Tokio, 151-858 Japanio.

Ĝia retadreso : <info@jcp.or.jp> kaj la fakso: 00.81.3.3350.1904.

Jen do mia artikolo:

"PROVŜTONO"

Traleginte en "Akahata" de la 8-a de januaro, artikoleton, ke sinjoro verkisto UKEZAWA Natuki deklaris en radio: "Mi konsilas al vi, karaj aŭskultantoj legi almenaŭ unufoje ĉiusemajne, "Akahata"-n", mi ekdeziris verki tiun ĉi artikolon. Mi estas konvinkita ke la fakto ke ĝi estos publikigita aŭ ne en "Akahata", estas provŝtono kaj lakmuso, kiuj elmontros, kia efektive estas la Japana Komunista Partio.

Mi mem estis siatempe ano de JKP, sed mi forlasis ĝin kiam mi spertis proprahaŭte, kiel ĝi estas netolerema. Nome, kiam mi estis ano de la redakta komitato de "Zinmin Bangaku" (Popola Literaturo), revuo laŭ la linio de JKP, simila al nuna "Minsyu Bungaku" (Demokrata Literaturo), mi publikigis kune kun TOKUNAGA Sunao[1] , estrarano de Sin Nihon Bungaku Kai (Asocio de Nova Japana Literaturo), kiu troviĝis en konflikto kun la t.n. reganta plimulto de JKP, komunan proponon, ke "Sin Nihon Bungaku (Nova Japana Literaturo), la organo de supre nomita Asocio, kaj "Zinmin Bungaku" -kuniĝu.

Rezulte mi estis unuanime mallaŭdita en la eksterordinara kunsido de la redakta komitato de "Zinmin Bungaku", kiun ekstre ĉeestis ankaŭ TAKAKURA Teru[2] kaj NISIZAWA Takazi[3] el la Centra Komitato de JKP, pro tio, ke mi faris tiun elpaŝon anticipe ne informinte la redaktan komitaton. Mi tamen ne akceptis tiun kondamnon, ĉar mi estis certa ke mia elpaŝo estis ĝusta. Ja, se mi estus anticipe informinta pri tio la redaktan komitaton, sendube mia projektata elpaŝo estus malaprobita de la plimulto kaj ne povintus realiĝi.

Mi ne plu volis resti en tia netolerema partio kaj forlasis ĝin. Pro tio mi estis stigmatita de JKP kiel kontraŭpartia elemento kaj ĉiel molestita de ĝi. La plej

drasta ekzemplo de tio estas, ke ĝi malhelpis kaj fine malebligis ke mia japana traduko de "Riporto skribita en la pendumila maŝo", la ĉefverko de Julius Fuĉik, eldoniĝu kiel volumo de populara Kappa Books (Libroserio Kappa[4]) de Kobun-sya, granda eldonejo en Tokio.

Poste okazis la Sesa Tutlanda Konferenco[5] de JKP kaj mi estis invitita realigi ĝin, sed mi ne akceptis tion, ĉar mi restis skeptika, ĉu vere JKP iros demokratan vojon, kiel ĝi publike deklaris en tiu konferenco, ĉar ĝi neniam publike agnoskis sian kulpon, ke ĝi malhelpis kaj malebligis la eldonigon de mia japana traduko de "Riporto". Tamen mi kelkfoje kontribuis al "Akahata", laŭpete aŭ proprainiciate.

Sed... mi estis denove stigmatita de JKP kiel kontraŭpartia elemento, kiam mi kontribuis al revuo "Komei" (Socia Justeco[6]) per artikolo, en kiu mi kritikis JKP-on, kaj ĝi eĉ rifuzis mian abonon al "Akahata".

Lastan aŭtunon mi eksentis ke la direkto de JKP ŝanĝiĝis. Bedaŭrata Jiri Pelikan[7] , ĉeĥa ĵurnalisto, petis min kontribui al revuo "Listy"[8] per artikolo pri la nuna stato de JKP. Laŭ li, sufiĉe multaj en Ĉeĥio ankoraŭ nun alte taksas la sintenon de JKP, kiu kondamnis la militintervenon de Sovetio en Ĉeĥoslovakion somere de 1968. Mi akceptis lian inviton, sed mi ne povus verki tian artikolon, mem ne konante la nunan staton de JKP. Por koni ĝin nepre necesus legi "Akahata"-n. Mi do sondis pri ebleco aboni ĝin per telefonado al TAKENOUE Taketosi, unu el la anoj de la konsilio de la urbo Hino, kiun havis JKP en ĝi, ĉar li loĝis en la setlejo Mogusa, samkiel mi. Kvankam mi estis sufiĉe skeptika pri tio, li tamen tuj akceptis mian abonproponon kaj eĉ tuj alportis al mi hejmen la lastajn kelkajn numerojn de "Akahata".

Mia kontribuo al "Listy" ne realiĝis ĉar intertempe Pelikan mortis. Tamen mi ne ĉesigis la abonadon de "Akahata" eĉ post kiam mi translokiĝis en oktobro antaŭlastjare en la setlejon Sakura Zyôsui de la kvartalo Setagaya, Tokio, sentinte ĉe ĝi ian allogon, spite al kontraŭstaro de mia filo. Lia kontraŭstaro ja ne estas senkaŭza, ĉar mia pensio nomata "oldula" estas monate nur 32450 enojn kaj tiu de mia edzino nomata "por socia sekureco" estas monate 93317 enoj. Do, entute monate ni ricevas 125.767 enojn[9] .

Mi estas tradukisto el la ĉeĥa literaturo, do mi povus almenaŭ modeste vivteni min kaj mian edzinon, se mi daŭre okupiĝus per tradukado el la ĉeĥa literaturo. Sed ĉar lastatempe mi ĉesigis tiun laboron, por ke mi povu dediĉi min al verkado de mia aŭtobiografio, mia vivoverko, mi havas preskaŭ neniom da kromenspezo.

Malgraŭ tio mi daŭre abonas "Akahata"n simple pro tio, ke en ĝi de tempo al tempo aperas artikoloj utilaj por mi, kiaj ne aperas en komercaj gazetoj. Se citi nur lastatempajn ekzemplojn : du artikoloj de la 27-a de januaro titolitaj respektive "Israelo : Rezervaj armeanoj proprakoste aperigis komunan opinion "Ne partopreni en subpremado" kaj "Wakayama: Pakistano alvokas por paco- pacondoj laŭtis kantado de civitanoj". Traleginte ambaŭ artikolojn mi tuj ekpensis ke ili estas diskonigendaj internacie per "Sennaciulo", la monata organo de SAT, mondorganizo de la laborista esperanto-movado kun sidejo en Parizo.

Sed ne eblis al mi diveni la latinliterajn formojn de la israela gazeto, en kiu estis publikigita tiu komuna opinio de la israelaj rezervaj armeanoj, kaj de la nomo de tiu pakistanano. Kion fari? Post pripenso mi kuraĝis pri ili fakse demandi la redakcion de "Akahata" mem. Mi tamen estis skeptika pri la rezulto des pli ke estis dimanĉo. Sed neatendite baldaŭ mi ricevis fakse respondon subskribita: SASAKI Sigeru. Dank' al tio mi povis ekscii, ke la latinliteraj formoj de la du propraj nomoj estas respektive Ha'reta kaj TARIQ Muhammad. Ĝojega mi tuj esperantigis tiujn du artikolojn kaj fakse sendis al la SAT-Centro en Parizo, kompreneble klare menciante, ke ili estas publikigitaj en "Akahata", la tagorgano de Japana Komunista Partio.

Feliĉe baldaŭ fakse atingis min sciigo de Kreŝo Barkoviĉ, la kroatdevena ĝenerala sekretario de SAT kaj samtempe redaktoro de "Sennaciulo", ke mia esperanta traduko de tiuj artikoloj aperos en la marta numero de Sennaciulo. Mi ĉe tio trifoje hurais, ĉar tio signifas ja, ke tiuj du artikoloj estos diskonigitaj tra la mondo per Esperanto.

*NDLR: Pro la fakto ke pro ia malbona funkciado de faksilo tiu ĉi teksto malfrue atingis la redakcion, ĝi aperas tiel prokraste.

1 Laboristdevena komunista verkisto, antaŭmilite mondfama pro sia romano "Strato sensuna".

2 Verkisto, kies historia romano "Tunela kanalo Hakone" estis slovakigita el la rusa traduko, de Imrich Zalupsky, la slovakiginto de "Krabŝipo" de KOBAYASI Takizi el mia esperanta traduko.

3 Poeto, la aŭtoro de la poemaro "Amigasa" (pajla ĉapeleto, aranĝita tiel, ke la vizaĝo de prizonulo, kiu ĝin portas, ne videblas). En kelkaj el liaj poemoj el tiu kolekto troviĝas vortoj de Esperanto, kiun li memlernis en prizono antaŭ kaj dum la milito

4 Fabela estaĵo, duone homo, duone besto, amata de japanoj. Zalupsky slovakigis "Kappa", longan novelon de AKUTGAWA Ryunosuke (1892-1927) el ĝia angla traduko. Troviĝas ankaŭ ĝia esperanta traduko "Kapao" fare de NOZIMA Yosutarô, eldonita en 1954, fotokopie represita en 1979, ambaŭkaze de Japana Esperanto-Instituto.

5 Tiu konferenco, okazinta en Tokio la 27.07.1955, deklaris definitivan forlason de maoista gerilado aplikita en Japanio, kies situacio tute diferencas de tiu en Ĉinio, kaj reunuiĝon de JKP sub la hegemonio de la opozicio nomata internaciista, gvidata de MIYAMOTO Kenzi, kiu estis antaŭmilite literatura kritikisto.

6 La monata organo de la partio Kômei (Socia Justeco), kies sponsoro estas Sôka Gakkai, amasa novbudaista organizo. Ĝi nun koalicias kun Liber-Demokrata Partio, kiu delonge regas la postmilitan Japanion.

7 Siatempa gvidanto de la studenta movado, kiu elektiĝis ano de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio okaze de ĝia eksterdordinara kongreso tuj post la invado de la sovetaj armeoj en Ĉeĥoslovakion somere de 1968. Li estis poste nomumita konsilanto de la ĉeĥoslovaka ambasadejo en Romo. Sed kiam li estis ordonita reveni en Ĉeĥoslovakion, li ne obeis kaj restis en Romo, kie li fondis disidentan revuon "Listy", kiu fariĝis organo de la socialista opozicio de Ĉeĥoslovakio, al kiu kontribuis ĉefaj disidentoj el kaj ekster Ĉeĥoslovakio, inkluzive de Vaclav Havel, la nuna prezidento de Ĉeĥio. La unuan ĉapitron titolitan "Kiel oni fariĝas komunisto" el lia franclingva aŭtobiografio "S'ils me tuent" (Se ili min mortigos) mi japanigis kaj serie publikigis en revuo "Kaoso kaj racio" en Tokio.

8 Esperante "Gazeto". Ĝi origine titoliĝis "Literarni listy" (Literatura gazeto) kaj kiel semajna organo de la Asocio de Ĉeĥoslovakaj verkistoj estis grava citadelo de la demokratiga movado en 1968, sed post la invado fare de sovetaj armeoj somere tiujare oni ĝin malpermesis. Do la verkistoj ĝin titolis simple "Listy" (Gazeto) kaj daŭrigis ĝin eldonadi, ĝis fine oni ankaŭ ĝin malpermesis. Pelikan do titolis la revuon, kiun li fondis en Romo, "Listy". Post la demokrata revolucio en 1989, kiu metis la finon al la komunista diktaturo daŭrinta eĉ 41 jarojn, "Listy" eldoniĝis kaj ĝis nun daŭre aperas en Prago.

9 1.086,63 eŭroj aŭ 965,21 USD laŭ la kurzo de la 16.03.2002.

KUNLABORU EN SENNACIULO !

Viaj reagoj....

Inter revoj kaj realeco troviĝas profunda abismo !

Tion skribis iam tre fama verkisto Willen Elschots, kaj li pravas.

Kiam oni devas malpermesi ion al plenkreskulo, ni povas konsideri la socion malbona. Plenkreskulo, kaj mi nun parolas pri homoj kiuj havas la kompetenton mem pensi, devas koni la limojn, kiujn oni ne povas transiri. Bedaŭrinde pluraj dogmoj kaj demagogoj vualas aŭ manipulas la limojn al propra profito aŭ kontento, kaj konfuzigas tiel la penson de multaj kompatindaj homoj, kiuj perdis, pro obeado al demagogoj kaj dogmoj, kapablon memstare pensi.

Kvankam mi, laŭ grava spertulo, ne posedas eĉ unu gramon da prudento, mi tamen scias ke, laŭ koncepto de humanisma penso, perforti virinon kaj viron ne estas permesata. Ni ne bezonas leĝon por scii tion.

Dum mia vivo, mi ofte informiĝis, kaj bedaŭrinde ankaŭ unu fojon sekvis idearojn de dogmoj. Ĉu pro manko da prudento aŭ pro atako de klereco, mi ne scias, sed iun tagon mi kapablis malligi min, konscie, de ĉiuj dogmoj. Mi deklaris min, iun tagon, dogma-libera homo. La decido kaŭzis ke mi ne plu havas, nek bezonas gvidanton, kiu povas permesi al mi aferojn, kiel ekzemple seksperforti virinon, aŭ diri ke mi, kaj la sekvantaro de nia dogmo, estas la elektita popolo, kaj pli de tiuj danĝeraj sensencaĵoj, kiuj estas rekta atako al humanisma penso.

Mia penso troviĝas en la penso propagandita de Zamenhof: 'ne faru al aliaj tion kion vi ne ŝatas ke ili faru al vi'. (Certe Z diris tion multe pli elokvente?).

Humanismo devas esti aplikebla en la tuta mondo por ĉiuj, kaj mi pensas ke ĉiuj homoj en la mondo, kun minimumo de taŭga eduko scias ke respekto por aliuloj ne nur necesas sed estas deviga.

Bedaŭrinde en la mondo vivas malgranda procento da malbonuloj, kiuj kuraĝas diri ke unu persono superas alian. Ili parolas laŭ la rasima penso. NI estas pli bonaj, NI estas pli kleraj kaj pli valoraj. Ĵeti ĉi tiujn homojn en frenezulejon ne eblas, ĉar kutime ili apartenas al la reganta klaso, al la potenco. Eĉ pli, oftege ili estis aplaŭdataj kaj respektataj, ĉu pro iliaj kapabloj trompi la idiotaron, ĉu pro la fakto ke ili povas krimi sen iri al malliberejo?(bona ekzemplo en Francio estas la nuna prezidento, sed certe ĉiu povas trovi en propra lando iun el tiu specio?) Pro tiuj homoj mi estas liberecano. Mi nek volas nek deziras ke ĉi tiuj malbonuloj estu estroj, potenculoj.

Nur la plej kompetentaj rajtas estri, kaj pro sia klereco ili ne estras sed prezentas siajn spertojn kaj kapablojn por ke aliaj kleriĝu por tiel povi plialtigi propran vivonivelon.

Mi legis librojn de Proudhon, Bakunin, Malatesta, Goldman kaj aliaj 'gravaj' anarkiistoj. Mi ankaŭ legis Marx kaj Engels, R.Luksemburg kaj Liebknecht. Feliĉe mi ankaŭ legis Georges Orwell por ke mi lernu relativigi la pensojn de la 'gravuloj'.

Kiel humanisto mi subskribas la 'Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj' kaj mi ankaŭ batalas por ke ĝi estu aplikata. Pro tio mi agadas en Amnestio Internacia, ĉar mi konscias ke en komuna agado ni havas pli da 'potenco'.

Kiel liberecano mi havas problemojn kun la fakto ke la 'Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj', por ĉiuj landoj kiuj subskribis ĝin eĉ ne valoras la paperon, al kiu skribiĝis la deklaracio. Kaj pli grandan problemon mi havas pro la fakto ke la mondo bezonas regularon pri memevidenteco, ke homoj devas respekti kaj doni liberecon unu al alia.

Mi legis en Sennaciulo, de junio sur paĝo 96, frazon kiu ŝokis min. Mi deziras, mi legis, ke la konsuloj de Francio rifuzu vizojn al homoj, kiuj ne sufiĉe konas la francajn morojn antaŭ ol veni al Francio!

Por ke mi ne eraru, mi evidente rapidis al la oficiala paĝaro pri 'Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj' kaj legis:
Artikolo 13
1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.
2. Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propra, kaj reveni en sian landon.

Uf, feliĉe la deklaracio estas tute klara kaj eĉ en Francio mi povas ferii, ĉar, sciu ke mi ne tiel alkutimiĝas al la moroj de la francoj. Do mi konsideras la frazon en S-ulo kiel la diro de la ekleziestro, kiu fajfas pri propra regularo.

Nu parolante pri enmigrantoj, por mi ĉiuj bonvenas en la loko kie mi loĝas. Mi jam havas ciganojn en la strato, du familiojn de Marokanoj kaj duono de la strato estas okupata de Turkaj familioj. Feliĉe ĝis nun neniu el ili seksperfortis min aŭ mian familion, ĉar tion turkoj faras, se mi bone komprenas la ĝeneraliĝon en la sama teksto.

Mi ne scias ĉu ĉiuj el ili parolas mian dialekton aŭ la nederlandan, sed tion mi ankaŭ ne scias de la afabla viro el domo kun nr 2 en la strato, kvankam li estas blankhaŭtulo, aspektas belga kaj loĝas eĉ ne 100 metrojn for de mia domo. Do la lingvo kiun homoj parolas, ili mem elektu kaj mi esperas ke kiam iu parolas al mi, ke mi havos minimuman scion pri lia lingvo. Kvankam la antverpena, nederlanda kaj esperanto estus pli facilaj por mi, mi senproblemoj volas esti afabla kaj fari iom da peno por povi paroli kun la najbaro.

O jes, mi nepre devas skribi ion pri famkonata Dutroux, kiu daŭre troviĝas en malliberejo pro akuzo ke li murdis kelkajn junajn virinojn. Jam 6 jarojn li estas en malliberejo, kaj mi demandas min kion pensas Amnestio pri ĉi tiu situacio, Vidu, laŭ psikologoj Dutroux estas psikopato, tre danĝera persono sen emocioj kaj sentoj, plene malsana en la kapo. Mi nun nur diras kion la specialistoj skribis kaj tiam mi demandas al mi, kial ni, la elstara raso de belgoj, malliberigas psike malsanegan personon. Mi ne pensas, el la raporto de la psikologo, ke iam oni povas resanigi Dutroux, sed kiom valoras la opinio de homo kiu posedas eĉ ne unu gramon da prudento? Filo de unu el la advokatoj de Dutroux, estis kolego de mi. Laŭ la informo de li oni povas doni Dutroux maksimume dumvivan prizonon, kiu signifas ke post 30 jaroj li liberiĝos el prizono. Se vi scias ke li jam 6 jarojn troviĝas en malliberejo kaj ke ni devas forpreni ĉi tiujn jarojn de la 30 jaroj, vi mem povas fari la kalkulon kiam ni denove havos psikopaton en nia socio.

Kiel humanisto mi estas kontraŭ prizonoj, ĉar ili estas simbolo de malbona socio, socio kiu ne kapablas eduki la loĝantaron. Ĉu ni vere devas malliberigi homojn? Eble jes dum tempo, sed ĉi tiu forpreno de libereco devas havi valoron, kian ĝi ne havas nun, almenaŭ ne en Belgio, eble en Francio kiu havas aliajn, certe pli altajn kaj valorajn morojn?

Laŭ informo, 7 procento de la belga loĝantaro apartenas al tiuj, kiujn oni nomas la 4a mondo. Plejparte ĉi tiuj homoj restas dum jaroj, se ne eterne en situacio sen oportunoj aŭ perspektivoj. Kiam oni devas batali por trovi minimumon da bazaj bezonoj, mi demandas, kiu devas troviĝi en malliberejo, la ŝtelisto de la mansako aŭ la demagogo kiu metas sin al la kapo de la socio kaj akceptas ekspluatadon de homoj. Kiu devas esti en malliberejo la ŝtelisto de la mansako aŭ la estro kiu trompas la ŝtaton (kiu estas ni kaj ne politika strukturo). Kiu devas esti en malliberejo la ŝtelisto de mansako aŭ la kapitalisto kiu ne pagas imposton, nur el propra profito kaj riĉo? Kiu kulpas, la homo el la 4a mondo aŭ la 'gvidantoj' kiuj krias pri sekureco de malantaŭ la seruroj kaj rigliloj, kun per kameraoj protektitaj vilaoj, plejparte pagitaj per nigra mono, kiu fakte devas aparteni al la sociala sekureco?

Mi ne havas la rajton juĝi homojn eĉ doni mian opinion se mi ne alportas ion al la debato. Mi nur konas miajn proprajn devojn, kiuj estas respekti aliajn homojn, kio, mi esperas, donas al mi la liberecon postuli ke ili respektu min?

Mia libereco ne finiĝas kie komenciĝas la libereco de aliaj. Ne, absolute ne. Mia libereco komenciĝas kie komenciĝas la libereco de aliaj kaj finiĝas kie finiĝas la libereco de aliaj.

Mi ne apartenas al politika movado kaj ankaŭ ne intencas aliĝi. Do mi ne misuzas iun ajn asocion, por celoj de politika movado kiun mi ne havas.

Kvankam mi havas sufiĉe da kritiko al Amnestio Internacio, mi regule agadas en ĝi. Mi staras en budo por konvinki homojn pri la valoroj, kiujn A.I. certe havas kaj regule skribas leteron al politikistoj, kiuj pensas ke ili rajtas organizi la mondon sub ŝildo de demokratio aŭ alia solvo, kiu respektas nur la opinion de parto de la popolo. (Kiom da usonanoj voĉdonis por Bush? Kiom da

francoj voĉdonis por la ŝtelisto, kiu nun estas prezidento. Al tia demokratio mi ne volas partopreni). Mi daŭrigas skribi miajn leterojn en la universala lingvo Esperanto, ĉar mi ne estas tiel skizofrena pensi, ke morgaŭ, pro miaj leteroj, ĉiuj diktatoroj komencos sisteme ekstermi la esperantistaron. Ĉiuj homoj havas respondecon pri propra vivo ankaŭ esperantistoj.


Universala Kongreso de esperanto okazis jam plurfoje en landoj kie homaj rajtoj ne estas respektataj. Kiam esperanto nur valoros por flati diktatorojn, mi adiaŭos ĝin kaj uzos la liberan tempon por traduki leterojn de A.I. al la lingvo de la diktatoro kiun ni volas atentigi pri liaj pekoj. Tiel A.I almenaŭ respektas lingvajn rajtojn.

En mia vivo mi havas multajn revojn pri bona mondo kun homoj kiuj, ĉiuj respektas la regularon de humanismo. Bedaŭrinde Willen Elschots pravis kaj kun ĉi tiu frazo ni denove estas ĉe la komenco. Inter revoj kaj realeco troviĝas profunda abismo.

Ni ne ĉesu revi,
kamarade Jakvo

PS, al J Lepeix, mi konsideras ĉi tiun tekston la lasta reago kiun mi donas al viaj insultoj pri mia persono. Ne malplialtigu vian nivelon tiel, ke vi debatu kun persono kiu eĉ ne posedas unu gramon da prudento.

NDLR: ŝajnas ke dum kongreso en Alikanto,la afero inter du gekamaradoj aranĝiĝis.



Frontpaĝo

Estimataj,
Pri la bedaŭrinda kovrilpaĝo de Sennaciulo de Majo 2002, mi deziras atentigi, ke la homoj kiuj en Francio demokrate esprimis sian opinion la 21an de aprilo 2002, ne pro tio estas faŝistoj, nek nazioj.
Ili tute simple estis lacaj pro la socialismo.

Aude André


NDLR: Sur la frontpaĝo nenie oni nomas la voĉdonantojn faŝistoj, sed nur diras **NE** al la faŝismo!

Ĵus aperis ĉe SAT:

Djémil KESSOUS
La UNIVERSALISMO

Prezo: 12 € inkluzive la afrankon. Mendebla ĉe SAT

Elkorajn gratulojn, nia Gaja Forĝisto !



La 25-an de majo, nia kamarado **Hermann SCHMID (30.484)**, konata kiel «Gaja Forĝisto», festis sian 80-jariĝon. Plej multaj el niaj membroj bone konas nian kamaradon, kiu organizis en Aŭgsburgo, kun sia kara edzino Margaret, eĉ tri SAT-kongresojn (1970, 1977 kaj 1997). Tiu k-do, ĉiam gaja kaj bonhumora, estas tre ŝatata en Esperanto-movado. Aktivulo en diversaj movadoj kaj sindikatisto, li akiris multe da sperto kaj multe da geamikoj. La pruvo estas, ke por la festo de lia naskiĝtago kolektiĝis pli ol 100 personoj en la restoracio «Schuster» de lia loĝloko Neußäs (apud Aŭgsburgo). Salutparolis al li la urbestro de Neußäs, reprezentantoj de Bavara E-Ligo, naturamika movado, sindikato ktp. Nome de la P.K. de SAT bondeziris al li k-do Barkoviĉ, kiu havis ŝancon partopreni tiun ĉi feston.
Do pli bonan sanon kara Hermann kaj longan vivon !

K.B.



Liberecana Frakcio

Anarkiista Malliberulo Bezonas Helpon

Longtempa anarkiista malliberulo, Harold H. Thompson, defias decidon kiu determinas ĉu usonaj gemalliberuloj povas ricevi poŝtaĵojn, kiuj enhavas «politikajn enhavojn». Nuntempe, de 22,000 ĝis 25,000 gemalliberuloj ricevas anarkiismajn, ekologiajn kaj best-rajtajn literaturojn. Thompson jam faras proceson dum pli ol 2 jaroj por certigi, ke tiu leĝ-rajto daŭros.

Lastatempe, distrikt-kortuma regreso (kutime, tiuj kortumoj antaŭjuĝas kontraŭ rajtoj de gemalliberuloj) signifas, ke pli intensa batalo necesas certigi, ke gemalliberuloj povas legi literaturojn, nomataj «Sekureca-minacaj Grupaj Materialoj» de la ŝtat-estroj.

La proceso estas grava afero, kun gravegaj implicoj por ĉiuj gemalliberuloj en Usono - aparte tiuj, kiuj stariĝas batali la sistemon. Ŝajnas, ke la proceso finiĝos en la usona supera kortumo por solvo. Sed Harold urĝe bezonas rimedojn daŭrigi la batalon.


Li restas konvinkita, ke tiu batalo povas, ne, devas esti gajnata. La penoj de Harold portas multajn esperojn. Se la proceso malsukcesus pro manko de mono, la malgajnantoj estus gemalliberuloj trans Usono.

Helpu se eblas, ni petas. Sendu monon al:

«Friends of Harold H. Thompson»
(Geamikoj de Harold H. Thompson)
c/o Anarchist Federation (Ireland)
PO Box 505
Belfast BT12 6BQ
Nordirlando

(Esperanto komprenata)





Ni legis por vi...

Lucija Borĉiĉ «**Pulsas la viv'**». *Poemaro, 128 p., 14x20 cm. Eld. Internacia Kultura Servo, pp 499, HR-10010 Zagreb. Prezo 8,50 €. Mendebla ĉe eldonisto kaj ĉe bonaj movadaj libroservoj.*



La biografio de L.B. (foto) fine de la verko, rememorigas ke l'aŭtoro estas gravulo en l'esperanta movado. Ŝi aktivas administre, traduke, memverke. Ĉu estas ŝi poeto? Intence, jes; oni ne povas malkonsenti kun ŝia difino de la temo en ŝia teksto «Poezio» (p. 88), kiu finiĝas per : " ... al la belo!". Du rimedoj nepras tiucelen: perfekta stilo, personaj ideoj, donantaj proprecon al la dirataj esprimitaĵoj kaj trovitaj metaforoj. La rezulto? Nedube ŝia skribmaniero perfektas. Ŝi - kiel la plimulto el la modernuloj - sin malligis de la klasika versarto, kvankam ŝi tute kapablas verki rondelon («Mi kongresis en Skotlando», p. 50) diskretan omaĝon al la Skota Skolo kaj al la fama dialogaro rondela Auld-Boulton. Sonelvokivo, asonancoj ne sekretas por ŝi (pompe pimpas; menso-lenso; knarantaj maksmiks-laĉoj...). Legu ŝin kiel modelon de efika stilo. Sed fine pri poezio? Ja kun poemoj oni devas familiariĝi, legi, delasi, relegi... Tamen mia persona impreso estas miksa. «Rigardi la belon» (p. 90) ne sufiĉas por nomiĝi poemo; la metaforo fina ja valoras, sed enestas ia manko en tiuj strofoj, aperantaj kvazaŭ skizo, krokizo, ne prilaborita pentraĵo. Same kio poezia, alloga, en «Ne lasu la ideojn fornebuli» (p.94)? Aforismo, sentenco, simpla rimarko ne estas poezio. Male kortuŝas la fina bildo de «Mia frato forpasis» (p. 102); male trafe ŝokvekas la figuro de «Repuŝo» (p. 115), al kiu mankas post stampo-rampo nur la rimo trampo! Konklude, eble duonplaĉos al vi «Ekzistas tagoj» (p. 85) «Seniluziiĝo» (p. 114); eble sengustos «Sen elektra lumo» (p. 58); male vi certe tre ĝuos «La vivo ne estas nur vegetado» (p. 63)... sed kial vi sekvus min en tiu mont-al-vala taksado? Pli bone obeu ŝian konsilon (p. 96):

...mi decidis
ne plu recenzistojn fidi ...

kaj juĝu vi mem. Vi nek perdos vian tempon, nek bedaŭros vian legadon.

Johan'Luko

S.A.T. ERINACO

Distra paĝo por seriozaj SAT-anoj

Krucvortenigmo

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
2											
3											
4											
5											
6											
7											

(R) = radiko de la vorto

Horizontale: 1. **Fundamentaj vortoj en la titolo de grava priesperanta eldono de SAT**; 2. Ligiteco inter du aŭ pluraj aferoj (R); Vasta etendaĵo de sala akvo (R); Inicialoj de la aŭtoro de «Vivo de Zamenhof»; 3. Frukto de unu el spicaj herboj (R); Faranto kaj veKASTa farunaĵo; 4. rabobirdo el la familio de akcipitredoj (R); Devigaj reguloj por la interhomaj rilatoj, inkl. la sankciojn; havi en la manoj (R); 5. Neklarigebla afero; Kaŭzanta la malhelpon de ies movoj aŭ agoj (R); 6. Prepozicio; Interne; Genro de herboj el la familio umbeliferacoj (R); 7. Karakteriza produto se temas pri tordo.

Vertikale : 1. rigardanta la faktojn nur laŭ ilia praktika valoro (R); 2. ilo por streki sur papero; 3. Fermita koniko (R); Mallongigo de radiuso; 4. Parto de la homa vizaĝo (R); Ĝeni per neoportuna insisto (R); 5. Kemia simbolo de astateno; Tio ĉi, kio sekvas; 6. Kemia simbolo de vanado; Tre zorganta pri senmakuleco de la vestoj (R); 7. Genro de dekpiedaj maraj krustuloj; Simbolo de oksigeno; 8. Senvosta amfibio; Du samaj konsonantoj; 9. numeralo; Apartenanta al unu el personaj pronomoj; 10. Simbolo de ampero; Larĝe kovri supraĵon per io (R); 11. Malhelpita en antaŭenmovo (R); 12. Esprimado de kontraŭa opinio, kun penoj malebligi efektivigon de la alia.

I. Moĉilnik

LASTMOMENTE

Ni ĵus eksciis ke la SAT-eldonaĵo

«7000 tagoj en Siberio»

ricevis OSIEK-premion.

Ni informos pli pri tiu evento en septembra Sennaciulo.